# *Konfirmo pri partopreno de 17 ?tatestroj en pintkunsido de Celac en Meksiko*




Meksikurbo, sep 13 (RHK) Entute 17 landoj de la Komunumo de Latinamerikaj kaj Karibaj ?tatoj (Celac) estos reprezentataj de siaj ?tatestroj a? registaroj en la VI-a Pintkunveno de la regiona instanco, kiu okazos en Meksiko, raportis oficiala fonto.

La meksika vicsekretario pri eksterlandaj rilatoj, Maximiliano Reyes Zúñiga, diris en sia Tviter-konto: "Ni tre ?ojas, ?ar Meksiko estos la renkontpunkto por Latin-Ameriko kaj Karibio la 18-an de septembro en la VI Pintkunveno (de la) CELAC".

"Dek sep  prezidentoj, 2 vicprezidentoj, 9 ministroj pri eksterlandaj aferoj kaj aliaj altnivelaj a?toritatoj reprezentos siajn landojn," klarigis la vicsekretario pri Latin-Ameriko kaj Karibio.

Inter la ?tatestroj, kiuj estos en Meksiko en la regiona konklavo, estas tiuj de Argentino, Alberto Fernández; el Kubo, Miguel Díaz-Canel; el Kostariko, Carlos Alvarado Quesada; de Ekvadoro, Guillermo

Lasso, kaj de Urugvajo, Luis Lacalle Pou. Krome, la gastiganta prezidento, Andrés Manuel López Obrador.

En la VI-a Celac-Pintkunveno,  la estonteco de la pridemandita Organizo de Amerikaj ?tatoj (OEA) estos traktita kiel unu el la centraj temoj.

La meksika ministro pri eksterlandaj aferoj, Marcelo Ebrard, jam plurfoje anoncis, ke la partoprenantoj preparos proponon, kiun ili faros al Usono kaj Kanado,  por anstata?igi la OEA-n, akuzitan pri enmiksi?o flanke de  alia regiona organo solidareca.

La konkludo de  la ?tatestroj kaj registaroj de  Celac   venontsabate,  estos prezentita al Usono kaj Kanado dum la unua duono de 2022.

Fonto: Telesur

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/internacionales/270040-konfirmo-pri-partopreno-de-17-statestroj-en-pintkunsido-de-celac-en-meksiko

Radio Habana Cuba